

„Tuj estas la najbaroj! Ili foriris tre frue hodiaŭ. Ili ricevis leteron. Ili neniam estis videblaj dum tago; sed hodiaŭ ili revenas. Mi vidos, kiu kaŭzon tio havas!“

Nenio povis esti pli utile al ni ol tiu lia scivolemo. Li eliris. Jam kelkajn minutojn poste li reenvenis kaj anoncis:

„Ili foriras! Ili ekvojaĝas! Nun al Buffalo kaj de tie per la neksta trajno al Chicago. Tute tiel, kiel la du *gentleman*-oj ĉi frue, kiuj ankaŭ iris al Chicago. Domage, ege domage pri ili! Pagis nur per *nugget*-oj!“

Post mallonga tempo ni vidis la fratojn Enters forlasi la hotelon kaj iri trans la ponto. La bagaĝo, kiun ili portis, poe konsistis nur el leda poŝo. Nun longe demandi ilin poste, kie kaj kiel ili dumtage estis pasiginta ilian tempon, pri tio mi ne havis kaŭzon; mi estis, almenaŭ intertempe, je la fino pri ili.

„Nun certe ni ankaŭ baldaŭ ekvojaĝos, ĉu?“ mia edzino demandis.

„Jes, morgaŭ frue“, mi respondis.

„Ĝis kie?“

„Hm! Se mi estus sole, mi veturadis ĵus rekte ĝis Trinidad!“

„Ĉu vi kredas, ke mi ne eltenos tion?“

„Estas peno, Koretinjo!“

„Ne al mi! Kiam mi volas, mi volas! Atendu, mi vidos.“

Ŝi iris al la *office* pro haviĝi la koncernajn horlibrojn. Ni elserĉis kaj kalkulis. Gravis, ne lasi nin vidi nek en Chicago nek en Leavenworth. Tio ne malfacilis, jam ĉar ni devis iri ne trans Leavenworth, sed trans la fakte tre proksime al tiu Kansas City. De tie sed estis ege longa distanco ĝis Trinidad, sed pro la kvalito de la amerikaj fervojaj vagonoj, kiuj ofertas ĉion, ajn kio estas atingeble je komforto, tio certe ne estis tiel malfacile transireble.

„Ni faras tion!“ diris la Koretinjo. „Ni veturos senhalte! Mi mem aĉetos la biletojn!“

Kiam ŝi parolas en tiu decidinta sono, tiam ŝi scias, kion ŝi volas, kaj tiel ni sidis jam je la sekvinta mateno en la telegrafe antaŭmendita kupeo de la *pullman*-kaj vaporumis al la ‚fora okcidento‘ kaj la tie nin atendantaj, esperinde ne danĝeraj okazaĵoj —.

„OKZIDENTULOJ“

Mi estis atentiginte la Koretinjon, ke ni, ekde la momento, en kiu ni forlasas la vagonon en Trinidad, devis rezigni pri ne malgrandan parton de la ‚civilizacio‘. Evidentiĝis, ke mi tree pravis per tio. Trinidad ja tute ne plu aspektis tiel kiel tiutempe, kiam mi vidis ĝin la unuan fojon situi inter prerio kaj montaro, sed ankoraŭ estis multaj aĵoj, kiuj mankis. Kiam mi demandis en la stacio pri *Mr. Pappermann* kaj lia hotelo, la alparolita oficisto respondis koncize:

„Ne ekzistas plu!“

„Kio?“ mi demandis. „Ĉu la hotelo ĉesiĝis?“

„Ne. Ĝi ankoraŭ ekzistas.“

„Sed *Mr. Pappermann* mortas, ĉu?“

„Ne. Li ankoraŭ vivas.“

„Sed Vi ja ĵus diris, ke ambaŭ ne ekzistas plu!“

„Ambaŭ kune, jes! Sed ambaŭ unuope ankoraŭ ekzistas! Ili nur disiĝis!“

La viro ĝojis senfine pri sia spritaĉa ŝerco, ridis kelkan tempon pri ĝi kaj tiam pluis:

„*Mr. Pappermann* vendis, devis vendi! Lia plendinda nomo kulpas!“

Post tio la viro, ankoraŭ ridante, foriris.

La hotelo ne meritis esti nomata tiel. Eĉ germana vilaĝa gastejo kutime aspektas pli invitece kaj pli bone: sed ni nu estis indikitaj tien, kaj krome mi neniam estus irinta en ian alian domon jam pro mia delonga kamarado. Ni ricevis du flankalflankajn ĉambrojn, kiuj estis ja malgrandaj kaj preskaŭ malabunde meblitaj, sed puraj. Tiuj tiel nomataj ‚ĉambroj‘ havis, kion oni aparte emfazigis, la grandan avantaĝon, ke iliaj du fenestroj estis ekstere al la ‚ĝardeno‘. Kiam ni vidis en tiun ĝardenon, ni rimarkis de kvar duone ruiniĝintaj muroj ĉirkaŭatan kvadraton, sur kiu troviĝis jenaj aĵoj: du malnovaj tabloj kun poe eĉ pli malnovaj seĝoj, preskaŭ tute senfolia arbo, kiu ege klopodis esti aŭ tilio aŭ poplo; kvar arbedoj, kiuj estis tute nekonataj al mi, eĉ ĉar tre verŝajne ili mem ne konis iliajn nomojn; laste kaj fine kelkaj dek herbotigoj, al kiuj oni ŝajne jam dum jaroj estis farinta la troan postulon estiĝi ia speco de gazono. Ĉe unu tablo sidis viro, kaj ĉe la alia tablo ankaŭ sidis viro, ambaŭ tiel, ke ni vidis iliajn vizaĝojn nur de la flanko. Unu havis bieroglason en la mano; sed li ne trinkis, ĉar ĝi malplenis. La alia havis cigaron en la mano; sed li ne fumis, ĉar ĝi estis estingiĝinta. Ambaŭ ne vidis al la alia, sed turniĝis la dorson unu al la alia. Ambaŭ estis gastejestroj. Tiu kun la malplena glaso estis, kiel ni eksciis poste, la nova gastejestro. Ambaŭ aspektis ne tre gaje, sed faris la impreson, kvazaŭ ambaŭ pentis la negocon kaj nun tre vigle pripensis, en kiu maniero ili povis gajni iom pli en la afero.

„Aŭskultu“, la *Koretinjo* diris, „tiu dekstre ŝajnas esti via amiko *Pappermann*. Li ĵus foje turniĝis flanken, kaj tiam mi vidis la maldekstran flankon de lia vizaĝo; ĝi bluas.“

„Jes, estas li“, mi respondis. „Li maljuniĝis, maljuniĝis kaj griziĝis. Sed ankoraŭ aspektas sufiĉe forte. Foje atentu! Mi vigligos lin, kaj kiel! Nur ne lasu vidi vin!“

Mi proksimiĝis plu al la fenestro, sed tiel, ke mi ankoraŭ estis kovrata de la muro, metis la montrofingron en la buŝon kaj imitis la oreŝiran militkriadon de la suoj. La efiko tiuj videblis. Ambaŭ ejestroj salte ekstaris de iliaj seĝoj, kaj la ‚blua *Makŝ*‘ elvokis:

„*Hallo, hallo*, la suoj venas, la suoj!“

Ambaŭ ĉirkaŭvidis al ĉiuj flankoj, kaj ĉar ili vidis neniun homon, ili vidis unu al la alia.

„Ĉu la suoj?“ la nova ejestro demandis. „Mi ja tree scivolas, de kie ili venu tien ĉi, meze en la urbon! Kaj tiel multajn tagrajdadojn for de la regiono, en kiuj ankoraŭ estas iuj!“

„Estis unu!“ *Pappermann* asertis.

„Sensencaĵo!“

„Ho ho! Mi ne faras sensencaĵon! Mi eĉ scias la detalan naciecon. Estis *Ogelaloso*!“

„Ne lasu ridi pri vi! Kiam tia —“

Li ne parolis plu, ĉar mi aŭdigis la kriadon duan fojon.

„Nu, aŭskultu! Se tiu ne estas vera ogelalo, oni distranĉu mian haŭton en rimenojn sur la torturofosto!“

„Do diru al mi, kie li estas!“

„Ĉu mi scias tion? Venis, laŭŝajne, de supre, alte super ni!“

„Jes, de malsupre, profunde sub ni tio ne povis veni, tio ĝustas! Estas petolaĵo, ne pli!“

„Ne, estas seriozo! Ja ne milita voko, sed signo, vera signo!“

Mi ripetis la vokon pluan fojon.

„Aŭskultu!“ Pappermann vokis. „Tio ne estas infaneca ŝerco! La viro aŭ vere estas ogelalo-suo aŭ olda okcidentmigranto de mia speco, kiu kapablas imiti la militan kriadon de la ruĝuloj, pro trompi ilin mem. Tio estas delonga kamarado, kiu vidis min sidi tie ĉi, kaj volas diri al mi, ke —“

Li estis interrompita, ĉar de la malantaŭa pordo de la domo eksonis virina voĉo:

„Rapide envenu! Mi ne scias, kion mi kuiru!“

„Ĉu kuiru? Oni ne volas nur trinki, ĉu?“

„Ne! Ankaŭ manĝi! Kaj eĉ loĝi!“

„Do ĉeestas fremdulo, ĉu?“

„Eĉ du!“

„Dank’ al Dio! Finfine, finfine refoje! Kie ili estas?“

„En numero tri kaj kvar! Geedza paro!“

Pappermann rapide interigis:

„Numero tri kaj kvar, ĉu? Tiuj situas malantaŭe! Je ĉi flanko! La fenestroj estas malfermitaj! Nun mi scias, kie estis kriinta!“

„Denove sensencaĵo!“ la nova gastejestro kontraŭis. „Ekde kiam oni nu aŭdas gedzajn parojn krii?“

„Tre ofte! Sed tie ĉi memkompreneble ne la virino kriis, sed la viro! Li estas kamarado de mi! Tiel ĝi estas, aŭ oni gudrumu, plumumu, linĉu kaj —“

„Do nur finfine envenu!“ li estis interrompata de la virina voĉo. „La fremduloj volas manĝi, kaj mi ja ne havas viandon en la domo kaj ankaŭ ne monon!“

Ili malaperis malsupre en la domon. Sed la Koretinjo diris per ridanta buŝo:

„Aŭskultu, jen ni ja iĝis en elstare brilan mastrumadon! Sed via maljuna Pappermann ne estas stulta kaj ankaŭ ne malsimpatia ulo! Li komencas jam nun plaĉi al mi, kaj mi —“

Oni frapis laŭte kaj forte sur la pordon.

„Envenu!“ ŝi vokis, interrompante sin mem.

Kiu enpaŝis? Memkompreneble Pappermann!

„*Pardon!*“ li petis. Mi tie malsupre aŭdis la militkrion de la ogelalo-suoj kaj volis — mi pensis — ŝajnis al mi — kaj — kaj — *Mr. Shatterhand, Mr. Shatterhand — ballo — welcome, welcome!*“

Li estis komencinta sian parolon flue, sed tiam, kiam li ekvidis min, haltis kaj rehaltis, ĝis li rekonis min kaj ĝojkrie eksaltis al mi. Li foretendis la brakojn, kvazaŭ li

volis ĉirkaŭbraki kaj kisi min, sed ekpensis, ke tio ne estus dece, kaj ekprenis nur miajn manojn. Sed tiujn li premadis, tiris ilin al sia koro, al siaj lipoj, faradis ĉiajn eblajn elvokojn de plej vera, plej elkora ĝojo, intertempe vidis al mi per larmaj okuloj ree kaj refoje; koncize, estis, kvazaŭ li ne povis lasi min per ravo. Oni diras, ke oni ne komparu homon kun besto, sed tie ĉi vere estis kiel la amo kaj nepriskribebla ĝojo de fidela hundo, kiu revidas sian mastron, saltas ĝojkrie ĉirkaŭ li kaj tute ne scias, kion li faru per kompleta ravo. Per kortuŝo larmoj aperis en la okuloj de la Koretinjo, kaj ankaŭ mi devis regi min pro resti ŝajne trankvile.

„Ĉu ne, kriis Vi, Vi, *Mr. Shatterhand*?“ li demandis, kiam la unua, interna tempesto estis pasinta.

„Jes, estis mi“, mi konfesis.

„M' sciis tion! Sciis tion! Ja nur povis esti iu kiel Vi!“

„Jes, nur mi“, mi ridis. Sed ne jen mia edzino, kiel Vi diris ĵus ĝuste al Via kolego.“

„Ĉu Via edzino? *'s death* — morto kaj diablo, do mi tute forgesis fari miajn komplimentojn! Ja estas bona moro sur ĉiu prerio kaj ĉiu savano, ke oni salutas unue la virinon kaj nur poste la viron! *Pardon!* Tion mi postfaras nun!“

Li provis fari tre devotan kaj tre elegantan kliniĝon; tiam mi menciis al li en lia kaj mia gepatra lingvo:

„Vi povas paroli kun ŝi en la germana, kara Pappermann, ŝi estas germanino.“

„Ĉu germane? Eĉ tio! Jen mi eĉ kisas ŝian manon! Aŭ pli bone tuj ĉiujn du!“

Li faris tion, sed certe per la gracio de urso, sed estis intencita bone. Tiam li tuj volis ekscii miajn sortojn pro poste rakonti siajn.

Sed tion mi ne akceptis, ĉar pro tiaj aĵoj ni havu la necesan liberan tempon kaj la ĝustan animstaton. Mi invitis lin manĝi kun ni, kaj petis lin diri malsupre, ke ni deziris manĝi en la ĝardeno, fakte nur post daŭro de unu horo. Ĝis tiam mi volis fari promenadon kun mia edzino, pro ke ŝi konatiĝu al la urbo, en kiu unu el miaj delongaj kamaradoj posedas tiun belan hotelon.

„Ne posedas, sed posedis“, li korektis min. „Mi rakontos tion al Vi.“

„Sed ne nun, sed foje poste! Al tiu mi ligas la peton paroli ankaŭ pri mi laŭeble mal multe. Ĉi tie neniuj sciuj, kiu estas mia nomo kaj ke mi estas germano —“

„Domaĝe! Ege domaĝe!“ li interrompis min. „Mi ĵus volis rakonti tie ĉi pri Vi —“

„Ja ne, ja ne!“ mi enŝovis. „Mi tuj forirus kaj neniam revidiĝus al Vi plu! Pro mi Vi povas diri, ke ankaŭ mi estas maljuna okcidentulo —“

„Fakte fama, tre fama!“

„Ne, neniukaze! Mi havas miajn bonajn kaŭzojn pro prisilentemo. Mi nun nomiĝas Burton, kaj Vi estis multe, multe pli fama ol mi. Ĉu komprenite?“

„Jes.“

„Ni do ne plu interparolos en la germana. Ja do ne faru ian eraron!“

„Ne zorgu! Mi nomiĝas Makŝ Pappermann, kaj se necesas, mi silentas kaj surdas. Mi supozas, ke estas ajn iu el Viaj malnovaj, aŭ plie denove novaj aventuroj?“

„Eble! Eble mi konfidus tion al Vi, sed nur tiam, kiam mi konvinkiĝis, ke Vi silentemas. Nun Vi iru!“

Li faris duan kliniĝon kaj foriĝis pro plenumigi la al li donitan ordonon. Ni sed faris la intencitan ĉirkaŭiron tra la urbo, de kiu ni venis ĝustatempe je la menciita tempo. Ni unue iris al niaj ĉambroj. De tie ni vidis, ke alvenis novaj gastoj, fakte ses junaj homoj, kiuj ankaŭ volis manĝi en la ,ĝardeno'. La tablo jam estis pretigita por ni, sed ne por ili. Por ili oni elmetis specon de tablego kun seĝoj. Tie ili nun sidis antaŭ botelo da brando kaj faris treegan bruon, ĉar la sola blanka tuko, kiun la gastejestro posedis, estis vastigita sur nia tablo, ne sur ilia. Ili estis devigintaj Pappermann:on sidiĝi ĉe ili, kaj li estis estinta sufiĉe saĝe obeiĝi al tio. Nun ili ĉiuj kriis al li. Ili ne nur volis ĉagreni lin, sed ankaŭ mistifiki lin; sed li kondukis tiel trankvile kaj netuŝite, kiel decis al li kiel maljuna arbaro- kaj savanmigranto. Tiu el ili, kiu parolis plej laŭte, nomiĝis, kiel ni eksciis pli poste, Howe. Ĝus kiam ni estis paŝintaj en niajn ĉambrojn, kies fenestroj ankoraŭ estis malfermitaj, ni aŭdis lin diri:

„Kiu nu estas tiu *Mr. Burton*, kiu volas havi tiujn avantaĝojn antaŭ ni?“

Pappermann mallonge vidis al niaj fenestroj. Li vidis min stari tie. Tiam li malrapide kapjesis kaj respondis:

„Li estas muzikisto.“

„Ĉu muzikisto? Kion signifas tio?“

„Li blovas la tirharmonikon, kaj sia edzino ludas la gitaron dum tio.“

„Ĉu blovas — blovas la tirharmonikon? Kial do lia edzino ne ankaŭ blovas la gitaron?“

Kriaĉa ridado rekompencis tiun malspritan ŝercon.

„Kial li parolas tiel stulte?“ la Koretinjo ĉagreniĝis.

„Lasu lin!“ mi petis. „Li havas sian intencon. Kaj tiu bonas. Mi supozas, ke evoluigas tie malsupre sceno, pri kiu la okcidentulo ĉiam havas grandan plezuron, fakte la riproĉa admono de homoj, kiuj pensas lin esti priridinde aŭ alimaniere malaltvalore.“

„Ĉu tiuj homoj do estas *romdy:oj*?“

„Mi pensas, ke ne, sed ili kondukas kiel tiuj. Tial ili meritas bonan lecionon eĉ multe pli, ol kiam ili vere estis tiuj. Mi supozas — ha, tiuj ĉevaloj! Ili ŝajne apartenas al ili!“

„Ĉu ili bonas?“

„Bonas! Tiu vorto esprimas tro malmulte!“

„Do valoraj?“

Mi hezitis respondi, ĉar mia atento nun ekskluzive estis koncentrata pri la ĉevaloj, pri kiuj tiu demand estis farita. En la malantaŭa ĝardena muro estis pordo al je konstruaĵoj libera nekultivata tereno, kiu estis estinta komplete malplene je nia alveno; sed nun tie estas kelkaj *peón:oj*, kiuj estis okupataj starigi tendon. En ilia proksimo estis du grupoj da ĉevaloj, al kiuj koncentriĝis mia tuta atento. Unu grupo konsistis el naŭ ĉevaloj kaj kvar muloj. La unuaj estis tiujn, kiujn oni nomas ,bonajn ĉevalojn', ne pli kaj ankaŭ ne malpli, la lastaj ĉiukaze devenis el Meksikujo, kaj idis el tiu tute elstare bona bredado, kiu tie havas la nomon *nobiliario*. La alia grupo estis nur tri ĉevaloj, sed kiaj! Ili estis malheliĝantaj blankaĉevaloj, sed ja ne nigre kaj blanke, sed nigre kaj rust-brune makulitaj, tute soleca, eminente nobla koloro, kiu atingeblas nur per longe daŭranta, penada bredado. Korpoformo, teniĝado kaj konduto memorigis min pri la famaj

nigraĉevaloj de mia Winnetou, sed ankaŭ pri tiuj persistemaj Dakoto-trotuloj, kiuj nun ne ekzistas plu. Ili estis breditaj de kelkaj nordaj indianaj triboj, kaj sukcesis pli per ilia senĉesa daŭriĝo, ol oni povis kapabli eĉ per la plej bona kurĉevalo.

Tion mi nun pensis, intertempe, ĉar pro povi diri pli certajn aĵojn, oni estus devinta iri tien pro rigardi kaj ekzameni ilin en la proksimo. Sed ke tiuj tri makulituloj havis la plej noblan sangon, tio videblis jam per la fakto, ke ili teniĝis aparte kaj kondukis ĝentile unu al la alia. Ili lekis kaj karesis unu la alian; ili hastiĝis unu la alian jen aj reen, kaj tiam rekuniĝis tiel dense, ke oni supozu, ke ili estus senkondiĉe gefratuloj aŭ almenaŭ kune naskitaj kunludintoj, kiuj neniam foje estis disigitaj unu de la alia.

En la proksimo de la tendo estis amasaĵo de kovrotukoj kaj aliaj vojaĝaj kaj provizaj aĵoj. Ankaŭ tieis multaj seloj, bone pli ol dudek. Ankaŭ kelkaj seloj por virinoj. Kial? Ĉu eble apartenis al tiuj ses trolaŭtaj junaj viroj ankaŭ kelkaj virinoj, kiujn oni nun ne jam vidis? Kaj ĉu la societo konsistis el tiom personoj, kiel tieis seloj, do el pli ol dudek? Ĝis nun oni nur vidis tiujn ses kaj la tri *peón*-ojn. Ĉiukaze mi ne estis erarinta antaŭe, kiam mi supozis, ke tiuj homoj ne estis *romdy*-oj, sed ĉiukaze ili estis tute sen brido kaj gvido, kaj veran edukadon, do koran edukadon ili ne ricevis; tion ili pruvis per la maniero kiel ili traktis la eksan gastejstron kaj poste eĉ aŭdacis trakti nin. Ili povis esti eĉ io pli malbona ol nur *romdy*-oj! Mi prenis miajn du revolverojn el la kofro, ŝarĝis ilin kaj enpoŝigis ilin.

„Pro la volo de Dio! Kion vi faras tie?“ demandis la Koretinjo.

„Nenion, kiu devus inciti vian aflikton“, mi respondis.

„Sed vi volas pafi!“

„Ne! Kaj eĉ se mi pafos, mi ja ne pafos al homoj.“

„Tamen! Ni ja pli bone manĝu tie ĉi supre!“

„Ĉu vi volas hontigi min en via propra interneco?“

„Ne!“ ŝi diris decidinte. „Venul!“

Ni iris malsupren kaj sidiĝis, sen saluti, ĉe nia tablo. Okaziĝis mallonga silento. Oni rigardis nin; oni pritaksis nin. Pappermann transe stariĝis de ilia tablo kaj transvenis al ni, ĉar ni estis invitinta lin manĝi kun ni. Ili kunigis la kapojn, kaj per la maniero, en kiuj ili interparolis, estis rimarkeble, ke estis pri ia petolaĵo, kiun ili volis fari al ni.

„Ili estas artistoj“, Pappermann diris, dum li sidiĝis ĉe ni.

„Kiaspecaj?“ mi demandis.

„Pentristoj kaj skulptistoj. Ili volas iri suden, al la apaĉoj, ili diris.“

„Ha! Kion ili volas aŭ devas tie?“

„Mi ne scias. Ili diris nenion al mi; mi nur konkludas tion per iliaj vortoj. Ili ŝajnas esti invititaj. Ili volas pluiri jam morgaŭ frue. Ili havas mil diablojn en la korpo. Neniu el ili aĝas tridek jarojn. Nematuraj buboj. Sed ili kondukas, kvazaŭ la saĝeco estus ĵetita en iliajn kapojn per ŝoveliloj. Ĉu vi aŭdis, kion ili demandis?“

„Jes.“

„Kaj kion mi diris al ili, kiu Vi estas, ĉu?“

„Ankaŭ tion!“

„Ĉu estis ĝuste?“

„Nek ĝuste nek malĝuste. Kion tiuj homoj pensas pri mi, estas egale.“

„Ho, eble ja ne! Ili ĉagreniĝas pri Vi. Mi antaŭsentas ian diablaĵon!“

„Ili venu!“

Apenaŭ ke mi estis dirinta tion, tiuj vortoj plenumiĝis. Howe stariĝis kaj malrapide transvenis al ni.

„Jen ekas!“ Pappermann avertis.

„Karas al mi“, mi respondis. „Nur lasu min agi, kaj ne enmiksigu!“

Tiam Howe estis atinginta nin, faris ironian kliniĝon kaj demandis:

„Ĉu *Mr.* Burton, se mi ne eraras?“

„Jes“, mi kapjesis.

„Vi blovas la harmonikon, ĉu?“

„Kial ne? Pro Vi tre aparte ŝate.“

„Kaj tiu estas *Mrs.* Burton, ĉu?“

Dum tio li montris al la Koretinjo.

„Certe“, mi respondis.

„Ŝi ludas la gitaron, ĉu?“

„Ĉu Vi eble deziras aŭdi ŝin ludi?“

„Ne jam nun, sed eble pli poste. Nun ni intertempe bezonas nur tion ĉi.“

Li tiris la blankan tukon de nia tablo, forportis ĝin kaj vastigis ĝin transe sur la tablego.

„Tio frapas! Tio eĉ estas impertinentel!“ Pappermann koleriĝis.

La Koretinjo tute ne mienaĉis.

„Nur restu trankvile!“ mi diris. „Ni toleros ĉion, ĉion!“

Venis la nova gastejestro, pro mem servi al ni. Li unue alportis la telerojn kaj la manĝilaron. Apenaŭ ke li estis turniginta sian dorson al mi, venis Howe, forprenis tiujn aĵojn de ni kaj transportis ilin. Post tio la gastejestro alportis la supon. Li vidis, kiel la afero estis, sed restis silente kaj metis la supujon ĉe ni sur la tablon. Tuj ĝi estis transprenata kaj malplenigata. Tiam oni reportis ĝin reen al ni. Tiel ne nur okaziĝis pri la supo, sed ankaŭ pri la aliaj manĝaĵoj, ĝis laste pri la fruktoj. La plenaj teleroj, pladoj kaj pladegoj estis forprenataj de ni, kaj oni redonis ilin malplenigite. Dum tio estis daŭra, nekomparebla mokado kaj ridado.

„Tiuj ne estas *nigger*-oj!“ Pappermann diris. „Tiuj ankaŭ ne estas *indsman*-oj! Sed ili estas blankuloj! Kion Vi diras pri tio, *Sir*?“

„Tion Vi verŝajne aŭdos tre baldaŭ“, mi respondis.

„Mi memkopreneble mendas aliajn manĝaĵojn por ni!“

„Ne, ne jam nun! Unue tiu ĉi farso estu ludita ĝis la fino. Kiam tiuj *gentleman*-oj ricevos iliajn manĝaĵojn?“

„Tio povas daŭri eble tutan horon. Mia eksa, bona kuiristino forestas, kaj la nova gastejestrino, kiu kuiras mem, permesas amason da tempo al si. Ĝis ŝi senplumigis junan kokinon, pasiĝas certe tutaj tri monatoj, ĉar ŝi eligas ĉiun plumon unuope. La grupaĉo fakte mendis koksupon; sed ankoraŭ tieis nur maljuna, sesjara kokino. Ĝis tiu estos senplumigita, povos pasiĝi, se mi ne tute kaj

plene miskalkulas, kvin ĝis ses monatoj. Nun demandu Vin mem, kiam tiuj *gentleman*:oj ricevos iliajn manĝaĵojn!“

„Bonege! Koretinjo, ĉu vi emas ludi la gitaron?“

„Kion vi volas diri per tio?“ ŝi scivolis.

„Tion vi ekscios poste. Nun nur diru al mi, ĉu vi emas! La tirharmoniko kaj la gitaro estas en miaj poŝoj.“

„Ha, la revolveroj, ĉu?“

„Jes.“

„Ĉu tio danĝeras?“

„Ho ne, tute kaj plene ne!“

„Do mi kunludas!“

„Bele! Mi kredas, ke la dua akto de la farso komenciĝas. La kurteno jam leviĝas.“

Howe revenis transe al ni, stariĝis antaŭ nin kun vaste disigitaj kruroj kaj parolis:

„Mi venas kun peto. Ni fakte estas pentristoj. Ni deziras portreti *Mr.* kaj *Mrs.* Burton:on, ankaŭ kune *Mr.* Pappermann:on.“

„Do Vi ĉiuj ses, ĉu?“

„Jes.“

„Nin ĉiujn tri, ĉu?“

„Jes, ĉu Vi permesos tion al ni?“

„Tre ŝate, tre ŝate. Mi nur postulas unu solan kondiĉon.“

„Kiun?“

„Ke ni povas resti ekzakte tiel, kiel ni sidas nun.“

„*Well!* Fakte ni volis havi Vin en alia pozicio, en tute alia, sed kontentiĝas ankaŭ pri tio. Sed sidu tiel, ke Vi moviĝas laŭeble malmulte, alikaze neniu vera artaĵo rezultiĝos! Oni komencu!“

Ili elpoŝigis foliojn kaj kraĵonojn kaj komencis desegni. Tiam ni vidis iun veni de fore eksterne al la malplenejo. Li estis vestita indiane kaj portis sur la dorso per ledaĵo kovritan ŝarĝon, kiu ŝajne ne malpezis. Li iris kliniĝite kaj per malrapidaj paŝoj. Li estis elstare lacigite. Ĉe la ĉevaloj li ekstaris kaj rigardis ilin. Tiam li pluiris. Kiam li estis alveninta tiel proksime, ke ni povis ekkoni lian vizaĝon, ni vidis, ke li aĝis eble dudek du aŭ dudek tri jarojn. Liaj trajtoj estis tre simpatiaj. Li estis kunliginta siajn harojn, ekzakte kiel iam Winnetou, al kresto, kaj lasis ĝin pendi longe trans la dorso. Li ŝajne konis la lokon, ĉar li venis rekte kaj tuj al la pordo, kiu kondukis de ekstere en la *ĝardenon*‘.

„*Egad*, estas li!“ Pappermann diris.

„Ĉu Vi konas lin?“ mi demandis.

„Jes. Estas la *Juna Aglo*‘. Li venis malsupren de la montaro nun antaŭ kvar jaroj, ne surĉevale, sed piedire, ekzakte kiel hodiaŭ. Li restis ĉe mi du tagojn pro ripozi. Krom la vestaĵoj, kiujn li surhavis, li ankaŭ posedis novajn, pli bonajn. Tiujn li donis al mi, kiam li foriris, pro ke mi tenadu ilin. Li diris, se li ne ekmortus, li revenos post kelkaj jaroj pro rehaviĝi ilin, pro depreni ilin. Li ne kunhavis monon, sed *nugget*:ojn, sed ne multajn; estis apenaŭ valore tri- ĝis kvarcent dolarojn. Ho ve, li aspektas lace kaj elĉerpite!“

„Li malsatas!“ mi aligis.

„Ĉu Vi pensas tion?“

„Mi nur ne pensas tion, sed fakte estas tiel. Mi povas vidi tion je li.“

„Ankaŭ mi sentas tion!“ la Koretinjo diris. „Li estas tute elĉerpita! Li ŝanceliĝas! Li manĝu kun ni! Mi diros tion al li. Rapide elportu pluan seĝon, *Mr. Pappermann!*“

La alparolito forhastis pro plenumigi tiun deziron. La Koretinjo stariĝis, iris al la pordo, al kiu la juna *indsman* alpaŝe venis, malfermis ĝin, akceptis lin tie, ekprenis lian manon kaj kondukis lin al nia tablo, kaj petis lin esti nia gasto. Kaj jen ankaŭ Pappermann jam alportis la seĝon. La indiano ja estis lace, sed li ne sidiĝis tuj, sed li ankoraŭ restis starante, siajn grandajn, malhelajn okulojn direktigite al la vizaĝo de tiu, kiu ekzorgiĝis tiel nekutime pri li.

„Tute kiel Nŝo-tŝi, kiu ĉiam estis kompatulino!“ li diris; tiam li fale sidiĝis sur la seĝon kaj fermis la okulojn.

Li estis tiel laciĝita, ke li tute ne estis havinta la ideon unue demeti la ŝarĝon, kiun li portis. Ni prenis ĝin de lia dorso, lozigante la rimenojn. Estis longa, peza, en ledajo volvita pako, kies pezo certe estis tridek aŭ kvardek kilogramoj. Devis esti fero! Ni metis tiun ŝarĝon flanke de li sur la teron. Pappermann transiris al la tablego kaj petis pri glaso da *brandy*.

„Por kiu?“ li estis demandata.

„Por la indiano tie, kiel Vi vidas!“ li respondis.

„La *brandy* ne estas por ruĝuloj, sed por blankuloj, ne por li, sed por ni! Foriĝu de tie ĉi!“

La maljuna okcidentulo ĉagreniĝis pri tiu malakcepto; mi trankviligis lin per la aserto:

„Ne ĉagreniĝu! Ili pagos tion al ni! Iru en la kuirejon kaj alportu teleron da supo, prenu ĝin de ajn kie Vi volas! Tio estas pli bone ol ĉiu da *Via brandy!*“

Li obeis al tiu ordono. La indiano estis aŭdinta miajn vortojn. Li ja ankoraŭ tenis la okulojn malfermite, sed li diris mallaŭte:

„Ne *brandy!* Neniam *brandy!*“

Li estis menciinta la nomon de Nŝo-tŝi, la fratino de mia *Winnetou*. Ĉu li eble estis apaĉo? Pappermann alportis la supon.

„Nur brogaĵo de la maljuna kokino“, li diris. „Sed tamen bonas!“

Li metis ĝin antaŭ la *indsman*-on; sed tiu ne moviĝis. Tiam la Koretinjo ekprenis la kuleron kaj komencis fluigi la supon en sian gaston. Pri tio transe ĉe la tablego estis komuna ridado.

„La kokbrogaĵo fakte estas nia!“ Howe diris. Sed pro la bela bildo ni volas rezigni pri ĝi. La sceno nun nomiĝas ‚La triobla sankta kompateco aŭ la per malsato pereanta indiano‘. Prete post kvin minutoj! Ajn kiu bezonas pli longan tempon, pagos unu botelon da *brandy!*“

Tiam rapidiĝis la kraĵonoj, kaj la kvin minutoj ne jam pasiĝis, kiam la ses karikaturoj estis prezentataj al ni. Sed ja eĉ ne estis karikaturoj, sed tute ordinaraj ŝmiraĵoj. Oni estis supozinta, ke ni ĉagreniĝus pri ili, kaj estus instigataj al ia stultaĵo; sed ni tute kontraŭe agis, kvazaŭ ni ĝojis pri tio, kiu fakte devis ĉagreni nin.

„Belege!“ mi diris. „Vere belege! Kiom kostas tia bildo?“

„Bildo, bildo!“ Howe ridis. „Bildo li nomas tian aĵon! Kostas neniom, neniom! Ni donacas ĝin al Vi!“

„Senkoste, ĉu?“ mi demandis.

„Jes.“

„Ĉu ĉiujn ses?“

„Sed jes, jes!“

„Dankon!“

Mi kunigis la foliojn, enpoŝigis ilin kaj tiam pluis:

„Sed mi estas deca ulo. Mi ne lasas ion donaci al mi sen prezenti min dankeme. Ĉu eble iu el Vi povas desegni min surĉevalo? Mi pretas elspezi tri, kvar aŭ kvin dolarojn, kiujn mi pagos pro tio.“

„Ĉu kvin dolarojn? *The devil*, tio ja estas alta sumo! Mi kuras, mi kuregas, mi hastas! mi tuj alportos ĉevalon!“ unu el ili vokis.

Li foriris, kaj la aliaj sekvis lin pro elekti la plej malbonan.

„Ĉu Vi havas ian intencon per tio?“ Pappermann demandis min.

„Memkompreneble! Nun venas la puno! Rapide enkuru al la gastejestro kaj diru al li, ke mi bezonas du ĝis tri bonajn, plenvalorajn atestantojn, laŭeble policistojn aŭ aliajn homojn de la urbestrado. Tiuj iru supren en niajn du ĉambrojn, kie ili povas aŭskulti kaj rigardi ĉion, kio okazigos.“

„*Well, well!* Estas farata, tuj!“

Li forkuris kaj jam reĉeestis, kiam oni alkondukis la ĉevalon. Howe postulis la kvin dolarojn antaŭe. Mi pagis ilin. Tiam mi rajtis surĉevaliĝi. Mi agis, kvazaŭ mi neniam antaŭe estis sidinta sur la dorso de ĉevalo, kaj trifoje provis suriĝi sen sukceso. Je la kvara fojo la svingo, kiun mi donis al mi, estis tro forte, tiel ke mi ne nur suriĝis, sed tuj refalis malsupren je la alia flanko. Estis laŭtega ridado. Finfine oni levis min supren kaj metis la kondukilon en mian manon. Tiam la desegnado rekomencis.

„Estos bonege, vere bonege!“ unu el la „artistoj“ elvokis. „*Mr.* Burton sidas alte kaj fiere sur ĉevalo kiel heroo kaj kavaliro, kiu venkas en ĉiu turniro!“

Kompreneble ĵus la malo estis la kazo.

„Ĉu tio veras? Ĉu tio veras?“ mi demandis ĝojegite kaj fiere.

„Certe, certe! Oni vidas, ke neniuj el ni povas rajdi same bone kiel Vi!“

„Ĉu vere?“

„Jes, vere!“

„Do diru, kiom kostas tia ĉevalo?“

„Ĉu Vi volas aĉeti ĉevalon?“

„Eble plurajn! Kiam Vi diras, ke mi estas tiel elstara rajdanto, mi ja estus stulte, se mi pluveturos per la multekosta trajno! La rajdado ja certe estas tre malpli multekoste! Ĉu ne?“

„Memkompreneble, tre malpli multekoste! Ni havas kelkajn troajn. Eble ni vendos unu el ili al Vi.“

Ili palpebrumis unu al la aliaj. Tiuj ja estis intencite kaŝe; sed mi tamen rimarkis ĝin.

„Nur unu, ĉu?“ mi demandis. „Mi bezonas kvin aŭ ses!“
„Ho! Por kiu?“
„Por mi kaj *Mrs.* Burton —“
„— kiu ludas la gitaron, ĉu?“ Howe moke interrompis.
„Jes. Kaj ankaŭ aliĝos kelkaj bonaj konatuloj, —“
„— kiuj ankaŭ estas muzikantoj, ĉu?“
„Se estas plezuro al Vi, jes. Plej ŝate mi prenis tri ĉevalojn kaj tri mulojn, kaj kune la necesajn selojn. Kiom kostas tio?“

Unue ili estis mirigitaj. Ili vidis al mi, ili vidis unu al la aliaj; tiam Howe demandis ekzamenite:

„Ĉu tri ĉevaloj kaj tri muloj? Nu kiujn?“
Mi montris al la muloj kaj respondis:
„De la ĉevaloj mi volas preni tiujn, kiuj nun kuŝiĝis, tie dekstre, kun la longaj oreloj.“
Tiam la seriozeco sur en iliaj mienoj tuj remalaperis. Sed mi pluis, montrante al la tri makulĉevaloj:

„Kaj la muloj tie same plaĉas al mi. Mi pagos ĉiun prezon!“
La ridado denove eksonegis.
„Tiuj muloj tiel! Kaj la ĉevaloj tiel! Tio bonegas, bonegas, nekompareblas!“
Tiel la ses voĉoj ĥaosis, kaj kiam la amuzeco iom malaltiĝis, Howe demandis:
„Vi pagos ĉiun prezon, ĉu? Ĉu? Kiom da mono Vi do fakte kunhavas, *Sir*?“
„Plenajn ducent kvindek dolarojn!“ mi fanfaronis. „Tio ja certe estas evidente pli multe, kiel kostas Via tuta bestaro!“

Nun la ridado fortiĝis. Ili kunmetis la kapojn pro kovi planon, kiu ĉiukaze nur estis avantaĝa al mi. Ili tute ne pensis plu pri mia surĉevala desegnaĵo, sed tre verŝajne nur pri tio, kiel ili povis ricevi miajn ducent kvindek dolarojn en iliajn manojn.

„Redeĉevaliĝu!“ Howe postulis al mi. „Vi plaĉas al ni elstare, jes, elstare, *Mr.* Burton! Vi havu la ĉevalojn kaj la mulojn, kaj eĉ la selojn kun tio! Vi eĉ povas havi ĉi ĉion senpage, se Vi volas!“

„Ĉu senpage? Kial?“ mi demandis.
„Ni volas vidi Vin rajdi, rajdi! Sur la ĉevaloj kaj ankaŭ sur la muloj! Ni nun metos la selojn sur ilin, sur ĉiujn ses! Vi tie ekstere suriĝas kaj galope enrajdas tien ĉi, sed ja ne tra la pordo, sed trans la muro!“

„Do salte, ĉu?“ mi demandis.
„Jes. Ĉu Vi riskos tion?“
„Kial ne? Vi ja mem asertis, ke mi estas bona rajdanto! Ĉu oni entute povas defali, kiam oni havas la piedojn en la ingojn kaj la kondukilon en la manoj?“
„Ne, certe ne!“ li ridis, kaj la aliaj kunblekis. „Do ĉiun ĉevalon kaj ĉiun mulon, kiun Vi glate galope enigis tien ĉi trans la muro, sen ke rompiĝas ĝia kolo, kaj sen ke Vi estas deĵetata, estos Via posedaĵo!“

„Ĉu mi rajtas demeti la ĉapelon pro tio, kaj ankaŭ demeti la jakon?“
Jen liaj kamaradoj fakte vokegis per amuzo; li sed regis sin kaj respondis:

„Vi rajtas demeti aŭ pro mi ankaŭ surmeti, ajn kion Vi volas. Eĉ se Vi volas vestiĝi kiel harlekeno aŭ pajaco, ni ne kontraŭus. Sed nun jen la ĉefa punkto, kies plenumigo decidis, ĉu tiu negoco realiĝos aŭ ne. Fakte Vi tuj eldonu la ducent kvindek dolarojn. Se Vi sukcesos la ses saltojn, Vi ricevos ilin, kune kun la ĉevaloj kaj la muloj. Se Vi malsukcesos, Vi ricevos nenion, kaj ankaŭ la mono estos nia. Vi ja certe komprenas, ke tio ne eblas alimaniere, ĉu?“

„Tutcerte! Vi vetas pri Viaj ĉevaloj, kaj tial memkompreneble ankaŭ mi devas meti ion sur la tablon. Mia mono ja valoras pli ol ĉiuj Viaj ĉevaloj, sed mi volas esti la noblulo!“

Denove ili ĉiuj ridis, Howe respondis dum tio:

„Tute ĝuste, tute ĝuste! Kaj ĉar ni tuj uzebligas niajn ĉevalojn kaj mulojn al Vi, Vi estas devigata ankaŭ tuj eldoni Vian monon.“

„Jes, tuj, kiam la kontrakto estos farita.“

„Kontrakto, ĉu?“ li demandis.

„Certe! Kontrakto. Mi aŭdis, ke la ĉevalkomercistoj estas la plej ruzaj uloj kiuj ekzistas, kaj ke oni devas ĉiam gardiĝi kaj certiĝi pri ili.“

„Sed ni ja ne estas ĉevalkomercistoj, sed artistoj!“

„Tamen! Estas ĉevalkomercado, tute egale, kiu aŭ kio ni estas!“

„*Well!* Mi konsentas. Alportu paperon!“

„Kaj mi diktas!“ mi diris.

Dum tio mi iĝis de la ĉevalo, fakte en maniero, kiu estis pli deglitado ol desalto. Howe sidiĝis. Mi diris al li la enhavon de la kontrakto, kaj li skribis ĝin, sen ŝanĝi unu silabon de tio. Li ja estis tute konvinkita povi subskribi ajn ion, sen ricevi malbonajn konsekvencojn, ĉar ja estis certa fakto al li, ke mi flugus de la selo jam je la unuaj paŝoj de la unua rajdo. Mi diktis per laŭta voĉo, ĉar vido supren al niaj fenestroj montris al mi la deziritajn atestantojn, kiuj ja devis aŭdi kaj kompreni ĉiun vorton. Mi aligis, ke mi devis transdoni mian monon al senpartiulo, ke li, kaj neniu alia, devis seli la ĉevalojn kaj la mulojn, kaj ke tiu nepartiulo estu *Mr. Pappermann*. Howe prezentigis same certe pri sia ekspekto pri la afero kiel liaj kamaradoj, tiel ke li estis tiel sengardiĝe ankaŭ akcepti tiun kondiĉon. Tiam ĉiuj subskribis, laste ankaŭ mi. Mi donis la kontrakton al la maljuna okzidentulo, kaj li enpoŝigis ĝin. Ekde nun mi povis konsideri la ses belegajn bestojn esti mia posedaĵo. Mi elpoŝigis la monujon kaj aligis la interkonsentitan sumon kun plezuro. Ankaŭ la Koretinjo ridetis. Kaŝe ŝi kapskuis al mi. La *indsmán*, kiu sidis kun ŝi ĉe la tablo, intertempe refreŝiĝis tiel, ke li rigardis la okazon per atento. Lia okulo fikse rigardis min ekzamine, kaj tiu vido diris al mi, ke li antaŭsentis la venontajn okazojn.

„Kaj nun eksteren pro selado!“ Howe ordonis.

Li kuris kun siaj kamaradoj eksteren tra la pordo, la maljuna Pappermann malantaŭ ili. Mi sekvis ilin per malhasta rapideco, kaj rigardis ilin dum tio. Ili sciigis la *peón*-ojn, kio nun devis okaziĝi. *Peón*-oj estas ĉevalflegistoj, servantoj, estas subuloj. Kutime oni elektas pro tio meksikanoj el la plej baza klaso; sed tiuj ĉi estis plenklaŭre videble *yankee*-oj, fakte tute spertaj viroj, ankaŭ ne plu junaj, sed certe jam multe pli ol kvardek jaraj. Kiam ili nun interparolis kun la ,artistoj‘, ili staris antaŭ ili ne kiel iliaj servistoj,

sed vere plie kiel iliaj estroj. Tio frapis miajn okulojn. Sed ili ŝajne konsentis pri la malbona ŝercaĉo, kies viktimo mi devis estiĝi, ĉar fine ili partoprenis en la ridado de la aliaj. Kiam Howe foriĝis kun du el ili, pro iri al la makululoj, la tria vokis post ili per amuzigita sono:

„Domaĝe, ke Sebulon kaj Hariman ne ĉeestas! Ili ridus ĝismalsaniĝe!“

Oni povas pensi, kiel tiuj du nomoj efikiĝis al mi! Do la du Enters:oj! Ĉar ke oni parolis pri tiuj du, tio kompreneblis per si mem. Ankaŭ la vico, en kiu la nomoj estis elparolitaj, ĝustis: Sebulon unue. Li konvenis al tiuj homoj multe pli bone ol Hariman, lia frato, kaj ankaŭ tutcerte estus pli ĝojinte pri la intencita petolaĵo. Sed mi nun ne havis la tempon sekvi tiun pensaron ĝis la fino, ĉar mi estis alveninta al la selaĵoj kaj devis elekti, kiu plaĉis al mi. Ĉu ĝi poste ankaŭ fakte taŭgis al mi, ne estis gravaĵo en tiu momento, sed mi jam nun havis certajn intencojn, kiuj intertempe bazis nur sur supozoj, sed poste evidentiĝis prave. Mi elektis virinselon kaj la kvin plej bonajn rajdselojn. El tiuj mi devis, se mi supozis ĝuste, interŝanĝi du pro du ŝarĝoseloj.

Ekde nun klaris al mi, ke tiuj ses personoj estis nek artistoj nek io alia deca, kaj preskaŭ mi bedaŭris, ke mi estis ludinta la rolon de preskaŭ malaltvalorulo, dum ja fakte estis ili, al kiuj, ajn io ili vere estis, mankis eĉ la plej kutima inteligenteco. Ĉar ke mi kapablis elekti el amaso da dudek seloj ĵus la kvin plej bonajn, tutcerte devis diri al ili, ke mi ne estis la mallertulo, kiun ili ĉiuj pensis min esti. Sed ili estis tiel blinde pri tio, ke unu el la *peón*:oj eĉ alportis al mi siajn grandajn spronojn pro ligi ilin al miaj botoj. Mi lasis tion okazi trankvile.

Pappermann unue selis la tri mulojn, tiam la makululojn. Tiuj akceptis tion, sed tiam ne toleris, ke iu proksimiĝis al ili de la flanko. Mi devis scii, ĉu tio koncernis nur la maldekstran, la suriĝan flankon, aŭ ĉu ankaŭ la dekstran. Mi do agis, kvazaŭ mi volus alpaŝi al ili ankaŭ de tiu flanko, sed dum tio ili ĉiam turniĝis tiel, ke ili tenis min antaŭ ili. Ankaŭ de malantaŭ ili ne permesis proksimiĝi neniun. Ili tiam piedbatis preskaŭ vivdanĝere per la hufoj, fakte ĉiuj tri. Nun mi sciis sufiĉe. Kun tiuj tri virĉevaloj estis multe pli facile salti trans la muro ol kun la muloj, pri kiuj nur poste klariĝus, ĉu ili estis bone edukitaj aŭ taŭgis nur pro ŝarĝoportado.

„Nun ek, *Mr. Burton!*“ Howe postulis al mi. „Jen la tempo! Ankoraŭ lasu nin nur reeniri en la ĝardenon, proke ni povas vidi kaj admiri Vin, kiam Vi venas alrapidigante!“

„Sed unue nu helpu al mi suriĝi!“ mi petis, paŝante al unu el la muloj.

Oni levis min supren kaj tiam ridante hastis al la ĝardeno. Sed la *peón*:oj restis ekstere, ankaŭ Pappermann. Li ne cedis de ilia flanko, kaj diris al mi per kaŝa kapskudo, ke mi povis fidi pri li tie ĉi. Li estis restinta la gardiĝema, ĉion pripensanta viro, kiun mi estis ekkoninta antaŭ jaroj.

Nun mi ekmovigis la mulon. Tute aspektis, kvazaŭ ĝi iris antaŭen per propra volo, unue malrapide, tiam iom pli rapide. Ĝi kuris antaŭen, maldekstren, dekstren, ŝajne tute laŭplezure. Ĝi turniĝis, iris laŭ arko, denove turniĝis, pluiris kaj eĉ provis trotadon. Mi ŝancelis jen kaj reen. Mi flankeniĝetis. Kelkfoje mi perdis la kondukilon, kaj tiam kaj tiam miaj piedoj glitis el la ingoj. Ĉi ĉio aspektis tiel komfortege, sed verece estis

severa, tre severa ekzaminado, kiun mi faris pri la mulo. Okazis ne unu paŝo sen mia volo, kaj mi rimarkis tre baldaŭ, kion mi devis pensi. La belega kreaĵo ĝuis la plej bonan meksikan edukon. Kiam mi ete, tre ete pretigis ĝin pro salto, ĝi obeis tiel ekzakte kaj tiel rapide, ke mi apenaŭ havis la tempon remalebligi tiun postulon per kontraŭpremo. Tiel ni proksimiĝis al la ĝardeno muro pli kaj pli, ĝis ni troviĝis ankoraŭ nur kvar aŭ kvin paŝojn antaŭ ĝi. Transe estis mokega ridado. Oni estis konvinkita, ke la mulo nur estis promenadinta tiel kun mi.

„Nun transen, transen, *Mr. Burton!* Transen!“ Howe vokis al mi.

„Nu, ĉu mi vere saltu?“ mi demandis.

„Memkompreneble!“

„Sed tiukaze ne pensu malbone pri mi poste!“

„Ne ekideos al mi! Nu venu!“

„*Salto! Alto! Elevado!*“

Dum mi vokis tiujn tri, dum salto kutimajn vortojn, ni rapidiĝis alte supren, trans la muro, kaj tiam staris transe tiel nemoviĝe kaj trankvile, kvazaŭ ni eĉ ne estus ekirintaj. Mia unua vido direktiĝis al la *indsman*. Liaj okuloj brilis.

„Fulmotondro!“ Howe malbenis.

Liaj kamaradoj faris similajn elvokojn.

„Ĉu nu?“ mi demandis lin. „Ĉu mi nun estas interne aŭ ankoraŭ ekstere?“

„La diablo Vinprenu!“ li kolere kriis al mi. „Ja tamen ŝajnas, ke Vi kapablas rajdi, ĉu?“

„Ĉu ŝajnas? Ĉu tamen? — Ĉu mi do asertis, ke mi ne povas rajdi?“

Mi glitiĝis de la selo, kondukis la mulon el la „ĝardeno“ sur la korton kaj fiksligis ĝin tie.

„Kial Vi irigas la bestaĉon tie elen?“ mi estis demandata.

Mi ne respondis, gaje kapskuis al la Koretinjo kaj iris pro haviĝi la nekstan mulon. Tiu faris la salton tute sammaniere kiel la unua.

„Jen vi vidas!“ Howe kriis. „La ulo povas rajdi! Li mensogis!“

Mi lasis tiun ofendon neriproĉate, kaj same kondukis la mulon sur la korton kiel la antaŭan. Tiam mi petis al la Koretinjo:

„Bonvolu lasi, dum mi alvenigas la trian, porti mian kofron malsupren, tien ĉi sur nian tablon!“

Kiam mi tiam atingis la lokon, kie la *peón*-oj atendis, unu el ili diris al mi:

„*Sir*, ŝajnas, ke Vi volas fari ŝercon pri ni, ĉu?“

„Se tio estus la kazo, mi nur havus ekzakte la saman intencon kie Vi!“ mi respondis.

„Gardiĝu, ke ne eble tio estiĝos seriozaĵo!“

„Ĉe mi ĉiu ŝerco estiĝas seriozaĵo. Ĉu nu estas alimaniere ĉe Vi?“

Li paŝegis proksime al mi kaj minacis:

„Mi avertas Vin!“

„*Pshaw!*“ mi diris forĵetante.

„Jes, mi avertas Vin! Sed per tute alia kaŭzo, kiel Vi pensas. Ĉevaloj ne estas stultaj muloj. Aŭ Viaj ostoj estos disbatataj aŭ Via kolo disrompiĝos!“

„Trankvile atendu tion!“

Mi nun ne plu pensis ke necesis agi simule. Mi svingis min sur la mulon, kiun Pap-permann tenis per la kondukilo.

„Kiel ĝi estos kun la ĉevaloj?“ li demandis min mallaŭte.

„Tute same!“ mi respondis.

„Sed ili ja ne permesas iun proksimiĝi!“

„Ne afliktiĝu! Mi ne nur proksimiĝos, sed ankaŭ suriĝos!“

Post tiuj vortoj mi rajdegis trans la loko kaj flugis trans la muro. Kiam mi venigis la mulon sur la korton, tiu jam estis preskaŭ tute pleniĝita per homoj. La afero estis famiĝinta, kaj la homoj alvenis pro rigardi ĝin. Al la ejestro tio karis, ĉar per tio li ricevis gastejojn. Ankaŭ la najbaraj kortoj kaj „ĝardenoj“ estis komenciĝintaj pleniĝi per spektantoj.

Mia kofro tieis. La Koretinjo mem estis kunestinta supre. Ŝi diris al mi, ke ĉe niaj fenestroj staris kvar atestantoj, tri policistoj kaj sinjoro, kiun oni estis prezentinta al ŝi kiel *corregidor*.

„Tio signifas tiom kiel urbestro. La homoj de meksika origino kutime uzas tiun hispanan esprimon“, mi klarigis al ŝi.

„Li alvenis nur iom poste. Fakte li estis alvenigita de unu el la policistoj, pro kaŭzo nekonata al mi. Li estis tre ĝentile. Ĉu vi bezonas ion el la kofro?“

„Jes. Unue mian interkonsiladan frakon.“

Mi malfermis la kofron kaj prenis el ĝi la menciitaĵon, kies juntoj estis ornamitaj per skalpobukloj.

„Uf!“ la *indsman* miriĝis per duonlaŭta sono. „Tion rajtas surhavi nur ĉefo! Kaj ankaŭ nur ĉe la interkonsilada fajro kaj dum tribaj festaĵoj!“

Mi demetis mian jakon kaj surmetis tiun indianan vestaĵon.

„Kial?“ la Koretinjo demandis. „Ĉu vi aŭdas, kiel la uloj tie transe ridas kaj mokas pri ĝi?“

„Lasu ilin fari tion. Eĉ kuniĝos la ĉefaj ornamaĵoj. Estas pro la ĉevaloj. Ili havis indianan edukadon. Ili ne lasas ian palvizaĝon proksimiĝi, escepte de ilia mastro, kaj ankaŭ mi certe ne povus iĝi en la selon, sen ŝanĝi miajn vestaĵojn.“

„Ha! Tial la kondiĉo rajti demeti aŭ surmeti ajn kion plaĉas al Vi, ĉu?“

„Jes. Vi vidas, ke ĉiu vorto estis prikalkulita, kvankam eĉ ne Vi mem sciis kial kaj pro kio.“

Kiam mi volvis la ĉefajn ornamaĵojn el la kovraĵo, la *indsman* elpuŝis duan vokon de miriĝo:

„Uf, uf! La vera plumaro de la militaglo, kiu nun ne plu ekzistas! Ĉu estas kvinoble dek plumoj?“

„Eĉ pli“, mi respondis.

Tiam li stariĝis respektoplene kaj parolis:

„Tiukaze mi devas eldiri saluton kaj mian peton pri pardono —“

„Silentu, silentu!“ mi interrompis lin. „Ni tie ĉi ne estas ĉe la interkonsilada fajro, kaj nur pro akiri la belegajn ĉevalojn mi malkovras tiujn kaŝindaĵojn, kies signifon oni feliĉe ne konas tie ĉi.“

Pro la speco de ornamaĵo, pri kiu koncernas tie ĉi, devis prenataj nur la du plej eksterflankaj flugilplumoj de la militaglo. Mia ornamaĵo longas de malantaŭ la kapo ĝis la tero, estas plej diligenteca, indiana laboraĵo kaj havas sian propran, tre kortuŝan historion. Kiam mi surmetis ĝin, du aŭ tri el la ses denove ekridis. Sed Howe tondris al ili kolere:

„Silentu! Ĉu vi nu ne vidas, kio nun okazu? Li konas la sekreton de la tri virĉevaloj! Tio ne priridendas! Sed mi esperas, ke lia kolo tamen poste disrompiĝos!“

Mi iris rekte meze tra ili, eksteren al la ĉevaloj. Tie staris la *peón*-oj. Neniu el ili diris vorton; sed se vidoj havus la efikon de pafilkugloj, mi nun estus kolapsinte tuj per iliaj. La makulatuloj nun ankoraŭ teniĝis dense proksime unu al la alia. Mi malrapide paŝis al ili. Ili rigardis min sen moviĝi. Iliaj ruĝecaj nazegoj ŝveliĝis. Iliaj malgrandaj oreloj komencis tremiĝi. Iliaj belegaj vosto ekmoviĝis. Du el ili lasis min alproksimiĝi, sed la tria spiregis. Ĝi cedis reen, sed sen piedbati aŭ mordi min. Tiu ĉi estis la plej ruza. Tiun mi volis lasi ĝis la lasta fojo. Ĝi havis malgrandan, helblankan makulon ĵus super la nazo, apenaŭ grande kiel fenigo, profunde klaran kaj sanecan okulon, karakteroplenan, malsekan kapeton, silkece briletantan felon kaj tiel senaĉaĵa korpoformo, ke mi jam nun, kiam ĝi tute ne jam estis mia posedaĵo, decidis rezervi ĝin por mi mem. Sed nun mi svingis min sur unu el la aliaj du. Ĝi toleris tion sen ia kontraŭaĵo, ĉirkaŭportis min dufoje galope laŭ cirklo, kaj tiam flugis kun mi trans la muro, kvazaŭ ĝi estus nur malalta ŝtupo. Laŭta aplaŭdo eksonis sur la kortoj. La ses ‚artistoj‘ sed silentis. Mi kondukis la ĉevalon al la muloj kaj tiam eliris pro haviĝi la duan. Ankaŭ tio sukcesis. Kiam mi tiam venis la lastan fojon eksteren al la *peón*-oj, tiu el ili, kiu jam foje antaŭe estis parolinta al mi, paŝis al mi kaj diris:

„*Sir*, Vi ja certe konfesas, ke Vi jam dekomence intencis, —“

„Doni lekcionon al Vi, ĉu?“ mi interrompis lin. „Jes, tion mi intencis fakte jes.“

„Nu bone! Tio okazis. Sed nun endas kaj devas esti sufiĉe! Ni ne plu kunagas!“

„Mi ankaŭ ne! Entute ne necesas! Ni ja tuj estos je la fino!“

„Ne jam tute. Ĉar iĝi sur tiun ĉevalon, tion Vi ne sukcesos!“

Li iris al la virĉevalo de malantaŭe pro ekpreni ĝian kondukilon; sed mi estis pli rapide ol li. La ĉevalo, kiu vidis lin veni, pensis, ke li volis enseliĝi. Ĝi turnis kapon kaj bruston al li kaj minace spiregis al li. Tion mi utiligis. Per kelkaj rapidaj paŝoj mi venis de malantaŭe — forta ekkuro, salto, svingo, kaj mi sidis supre. Sed nun rapide en la piedingojn kaj al la kondukilo! Jam la makululo saltis per ĉiuj kvar kruroj en la aeron. La *peón* estis devigata salti flanken, pro ne esti trafata de la hufoj.

„Hundo!“ li kriis al mi. „Tion vi rekomencu!“ Kaj turniĝinte al siaj kamaradoj li aligis: „Rapide kunvenu sur la korton! La interkonsento ne validu! Li redonu ilin ĉiujn, ĉiujn!“

Li forkuris kun ili. Kiam mi nun jam sidis sur la ĉevalo, ili ne plu povis malhelpi al mi finiĝi nun ankaŭ la lastan salton. Do ankoraŭ nur gravis, fordoni miajn bonmeritajn akiraĵojn de mia penado. Tial ili hastis pro laŭeble veni tien antaŭ mi. Ili fakte estis konvinkitaj, ke tiu lasta ĉevalo ne tiel vole obeus al mi kiel la aliaj du. Sed pri tio ili eraris. Nun ke mi jam estis foje fikse en la selo, ĝi eĉ ne ekfaris provon deĵeti min. Tio

estis la efiko de la indianaj vestaĵoj, kies aspekto kaj flaro trompis ĝin. Sed mi tamen estis rekoninta min. Ĝi sciis, ke mi ne estis ruĝulo, sed blankulo, tial ĝi hezitis. Mi evitis devigi ĝin per la spronoj. Des pli mi provis bonajn vortojn. Ĉar mi havis la supozon, ke ĝi originis de Dakota bredo, mi unue provis tion en tiu lingvo, fakte per la ĉe la dakotaj triboj kutima instigaj vortoj por ĉevaloj:

„*Ŝuktanta tebike, vaŝté! Amani-vo, tokije-vo* — estu bone, estu bone, kara ĉevalo! Kuru, kuru; iru plu!“

Tiu postulo estis sen ia sukceso. Do mi pluis la provon en la apaĉa:

„*Intŝu, arkugo! Tatiŝá, nakate elkantaŝ* — estu bonvole; estu bone! Kuru, kuru!“

Ĝi rektigis la orelojn kaj svingis sian voston. Do ĝi konis la tiujn vortojn, kvankam ili ankoraŭ ne estis la ĝustaj. Tial mi ĝin provis nun en la Komanĉa:

„*Miaro, namaĥco* — pluiru; rapide —“

Meze en tiu alvoko mi ĉesis. Ne necesis fini ĝin, ĉar la virĉevalo elpuŝis malaltan sonon de ĝojo kaj tuj komencis ludumi per ĉiuj hufoj. Kaj jen mi ekhavis ideon, kiu fakte ŝajnis nereale, sed poste realiĝis kiel vere. Fakte mi ekmemoris la noblan, malhelan rozfelulon, kiun rajdis mia amiko Apanatŝka, tiutempe ankoraŭ la ĉefo de la Najeno-komanĉoj per ega favoro. Mi menciis kaj priskribis tiun ĉevalon en la unua volumo de ‚Old Surehand‘. Kaj mi sciis, ke kaj Apanatŝka kaj Old Surehand estis ege klopodintaj unuigi tiun belan komanĉan specon kun la favoratuloj de Winnetou kaj la plej bonaj dakotaj trotuloj, pro bredi ĉevalojn, en kiuj kunfluis la avantaĝoj de tiuj tri rasoj. Tiu intenco sukcesis. Ili nun ambaŭ posedis plurajn grandajn bredejojn, el kiuj la plej eminenta estis transe ĉe la Bijou Creek, kiu estas flankrivero de la suda Platte. Tie Old Surehand estis lasinta konstrui loĝdomon ĉe la komercejoj, en kiu li kutime pasigis kelkajn monatojn de la jaro. Al tiu per tre bona gusto meblita vilao estis celita, kiam li skribis al mi en sia mesaĝo: „Supozu, ke mia domo estas via, ankaŭ kiam ni ne estas hejme.“ Ĉu tiuj tri makulituloj do venis de tie? Ĉu eble ankaŭ la muloj? Ĉu ankaŭ eble la ses tiel nomataj ‚artistoj‘ kune kun iliaj *peón*-oj estis ĉevalŝtelistoj? Fakte tio ne tute neblis. Trinidad estas ĝenerale konata pro ĝia ĉevalkomercado, kaj al tia fibubaro same komforta kiel vizitenda loko pro forvendi la rabbitajn varojn.

Ĉi ĉio nun iĝis fulmrapide tra mia kapo, sed sen ke mi havis la tempon fikstani la penson kaj sekvi ĝin plu. La virĉevalo komencis, kiel jam dirita, dancumi kaj ludumi per ĉiuj kvar hufoj. Ĝiaj du amikoj kaj parencoj forestis. Ĝi volis sekvi ilin, volis iri al ili. Mi ekregis lin forte, kaj tiam galopigis ĝin, sed nur ĝis la muro. Tie mi haltigis ĝin. Per malalte grumblantaj sonoj ĝi petis min lasi sin transe. Tion mi estis volinta aŭdi. Ĝi ne estis muta; ĝi parolis! Nun mi plenumigis ĝian deziron. La muro estis, kiel la faka rajdanto kutimas esprimi, de la virĉevalo ‚prenata per plej alta eleganteco‘.

„Venko, venko! La ĉevaloj estas liaj, estas liaj!“ eksonis multvoĉa voko.

Pappermann estis laŭeble rapide kurinta malantaŭ mi. Mi translasis la ĉevalon al li, pro konduki la ĉevalon al la aliaj sur la korton.

„Haltu! Restu!“ Howe vokis al li ordonece. „La virĉevalo estas nia posedaĵo, kaj ankaŭ ĉiuj aliaj. Ili revenu tien ĉi, tien ĉi al ni!“

Li ekprenis la kondukilon. Jen mi paŝis al li kaj respondis:

„La manon for de la ĉevalo! Mi nombras ĝis tri: Unu — du — tri —!“

Li ne lasis la kondukilon. Tial mi puŝegis mian pugnon je ,tri‘ sur lian flankon, tiel ke li flugis meze inter siajn kamaradojn kaj tiam falegis sur la teron. Li volis tuj restariĝi, pro laŭeble rapide rekompenci tiun puŝon al mi, sed ne sukcesis tion. Li povis releviĝi nur malrapide, kaj antaŭ ke tio okazis, jam alia agis laŭ lia intenco, fakte la *peón*, de kiu mi estis nomita ,hundo‘. Per pugnitaj manoj li venis al mi kaj kriis:

„Ĉu bati, ĉu bati vi ankaŭ volas? Tio ja ne bonfartigu —“

Li ne povis paroli plu. Li estis interrompata de la nova gastejestro, kiu ĵus venis en la ,ĝardenon‘, sekvate de kelkaj robustaj, muskolfortaj viroj, al kiuj li estis rapide mansigninta alveni, pro interpaŝi ĵus en la ĝusta momento.

„Silente, silente! Fermu la bekon!“ li superkriis la *peón*-on. „Jen venas la mangâjo! La supo! Finigu Vian aferon, kiam estos mangîta. En mia hotelo ne estas permesata tuj ekbatigi ĉiun pugnon! Sed anstataŭe tie ĉi estas la devizo: unue la kokino, tiam la negoco!“

La viro estis ruze. Pro kvietigi la *peón*-on li unue transdonis la kulpon al mi, sed ĵetis dum tio al mi peton per la okuloj ne pensi tro malbone pri la ,ekbatigo de ĉiu pugno‘. Dum la aliaj, malantaŭ li, alportis la telerojn kaj mangîlaron, li portis la supujon kun la kokinsupo. Dum liaj vortoj li metis la manon en ĝin kaj eltiris la maljunan, finbrogintan kokinon je unu gambo kaj tenis ĝin alte supre, tiel ke ĉiu povis vidi ĝin. Kion li estis antaŭkalkulita tiel ruze, tio okazis. De la najbaraj kortoj kaj ,ĝardenoj‘ sonis laŭta ridado transe al ni, kaj amaso de gajaj voĉoj ĥaose vokis:

„Tute prave! Tute prave! Unue la kokino, tiam la negoco! Vivu la kokino! Ĝi vivu!“
Tio efikiĝis.

„Well!“ la *peón* vokis. „Ĝi estu! Unue la kokino, tiam la ĉevaloj. Sidiĝu! Ni mangâs! Tiu *Mr.* Burton povas atendi, ĝis ni finiĝis!“

„Ne! Li ne atendu!“ Howe kontraŭis, kiu lamis al sia seĝo pro sidiĝi. „Li faru muzikon por ni! Ĉetablan muzikon! Li blovu la tirharmonikon, kaj *Mrs.* Burton ludu la gitaron!“

„Jes, tion li faru, tion li faru!“ la *peón* konsentis pri li, dum li ordonece mansignis al mi. „Alportu la tirharmonikon! Kaj alportu la gitaron!“

„Tuj!“ mi respondis. „Tuj!“

Mi paŝis al la Koretinjo, prenis la revolverojn el la du eksteraj poŝoj de la antaŭe demetita jako kaj demandis ŝin:

„Ĉu vi povas pensi, kio nun venu?“

„Jes“, ŝi respondis.

„Kaj ĉu vi havas kuraĝon?“

„Mi pensas, ke jes!“

„Do venu!“

Mi streĉis la ĉanojn de la revolveroj kaj donis unu el ili en ŝian manon. Ĝis nun mi estis starinta tiel, ke oni ne povis vidi la armilojn. Sed nun mi turniĝis kaj iris al la tablego, la Koretinjo tuj sekvis min. Levante la dekstran manon kun la revolvero mi diris:

„Jen mia tirharmoniko!“

„Jen mia gitaro!“ la Koretinjo minacis.

„La ludado komencas!“ mi pluis. „Ajn kiu el Vi ekprenas la armilon, ricevos rekte tuj kuglon! Se nia manĝaĵo antaŭe estis por Vi, Via nun estas por ni! Bonvolu, *Mr. Pappermann*, ekprenu! Transportu la tablotukon al ni! Transportu la telerojn kaj la manĝilaron! Kaj transportu la kokinon!“

Kelkajn momentojn ĉie regis profunda silentado. Mi vidis, ke la revolvero en la mano de mia Koretinjo ete tremis. Per la alia mano ŝi ekprenis mian brakon pro esti fikse. Sed la minaco efikiĝis. Neniu el la „artistoj“ kaj la *peón*-oj riskis moviĝi. Kaj nun ĉie ĉirkaŭe eksonis ĝojkrianta aplaŭdo.

„Ankaŭ transportu la kokinon!“ vokis, kriis, ridis kaj mokis ĉiu, kiu havis voĉon. „Transe, transe! La kokinon, la kokinon!“

Pappermann ekprenis pro plenumigi mian ordonon, kaj neniu malhelpis al li fari tion. Ekestis amasaĵa moviĝo ekstere sur la korto. Iu volis iri de tie en la „ĝardenon“.

„Venas la *corregidor*!“ mi aŭdis. „La *corregidor*!“

Do la sinjoro urbestro mem! Kaj malantaŭ li la tri policistoj. Do niaj atestantoj. Sed ili ne nur venis kiel atestantoj, sed ankaŭ per tute alia, multe pli danĝera kaŭzo. La *corregidor* unue turniĝis, kiam li estis atinginta nin, al mi:

„Enpoŝigu la revolverojn, *Mr. Burton*! Ili faris ilian servon kaj estas nun, ĉar mi okupiĝas mem pri la afero, ne plu necese. La ĉevaloj kaj la muloj estas Viaj. Neniu homo povas forpreni ilin de Vi. Kaj ankaŭ Via mono reapartenas al Vi!“

„Ho ho!“ vokis la jam ripete menciita *peón*, kiu ne plu vidis niajn armilojn direktigite al si. „Pro tio ja certe necesas ankaŭ ni!“

„Memkompreneble ankaŭ necesas Vi! Speciale Vi! Mi ege deziras ekscii Vian nomon! Sed ja ne malĝustan, sed nur la veran!“

„Mian nomon, ĉu?“ la *peón* demandis. „Kial? Mi tute ne uzas malĝustajn nomojn!“

„Mi konas almenaŭ dek ĝis dek unu, kiujn Vi uzis ĝis nun pro kaŝiĝi. Via vera nomo estas Corner. Kun la lasta malĝusta nomo Vi estis akuzita pro rabo kaj ĉevalŝtelo mal-supre en Springfield, sed Vi fifuĝis!“

„Tio ne veras! Tio estas mensogo! Tio estas fiaĵo! Mi estas honesta viro, kaj neniam, ankaŭ ne unu fojon defraŭdis valoraĵon eĉ ne de unu cendo de alia homo!“

„Ĉu vere? — Ĉu Vi volas vidi iun, kiu ne nur asertas la malon, sed ankaŭ provas ĝin?“

„Alportu lin!“

„Jen li estas!“

La oficisto dum tiuj vortoj faris paŝon flanken, tiel ke la ĝis tiam malantaŭ li starinta policisto videbliĝis. Tiu kapsignis ironiece al la *peón* kaj diris:

„Vi certe konas min, *Mr. Corner*, ĉu? Estis mi, kiu arestis Vin en Springfield, kaj mi ripetis tion nun hodiaŭ per la plej granda plezuro. Mi estis intertempe dunginta tie ĉi en Trinidad!“

Apenaŭ ke la *peón* estis vidinta tiun policiston, kaj aŭdinta liajn vortojn, li el-vokis:

„Tiu fiulo estas tie ĉi, tiu fiulo! La diablo forprenu Vin ĉiujn! Venu!“

Dum li faris tiun postulon al siaj kunuloj, li faris salton, kiu igis lin ekster nia

proksimo, kaj li tuj senhezite forkuris, el la ĝardeno sur la liberejon kaj al la loko, kie staris la ĉevaloj.

„Malantaŭ li! Li volas fuĝi!“ la *corregidor* ordonis, dum li mem ekkuris malantaŭ li. Sed la *peón* ne fuĝis sole. Ĉiuj liaj kunuloj estis salte stariĝintaj kaj agis laŭ lia ekzemplo per rapideco kaj lerteco per kiu estis ekkoneble, ke ili, rilate al tiuj okazoj, posedis eminentan sperton. Ankaŭ mi estas kutimiĝinta agi tre rapide, se foje agendas. Mi do ekagis laŭeble rapide, sed mi nur sukcesis ekkapti kaj fiksteni la lastan el ili. Li ja volis defendiĝi kaj deŝiriĝi, sed Pappermann, kiu estis elstare forta, prenis lin el miaj manoj, ĵetis lin sur la teron kaj genuiĝis tiel sur lian bruston, ke li ne povis moviĝi plu.

Nun oni vidis ilin kuri, ĉiun, ĉiun. La fuĝantoj atingis iliajn ĉevalojn, sursvingiĝis kaj forrajdegis, kunprenante la kvaran mulon kaj ankaŭ la ĉevalon de ilia subigita kamarado.

„Fiuloj!“ tiu kolere elvokis, kiam li vidis tion. „Kio nun okazos al mi!“

„Tio dependas de vi mem“, mi respondis.

„Kial?“ li demandis.

„Atendu!“

Mia atento estis nun direktigata al la preskaŭ ridiga spektaĵo, kiu nun okazis tie ekstere. Ja ne nur kelkaj, sed vere ĉiuj ĉeestantoj estis ekokupiĝintaj pri la persekutado. Eceptoj estis nur Pappermann, la gastejestro kun liaj anoj, la indiano, mia edzino kaj mi. Ankaŭ la najbaroj kun iliaj eksteraj rigardantoj estis salte alkurintaj kaj sekvis la fuĝantojn. Ankaŭ nun, kiam tiuj forrajdis, ne ekideis al ili halti aŭ reeniri, sed ni aŭdis la *corregidor*:on voki:

„Rapide al la *corral*:oj! Kaj tiam malantaŭ ili!“

Corral:oj estas ĉirkaŭbaritaj, liberaj ejoj, sur kiuj oni restigas la ĉevalojn. Tiaj ejoj estis multoble por la enloĝantoj de Trinidad. Al ili oni nun hastis pro laŭeble rapide ankaŭ haviĝi rajdobeston kaj poste sekvi la spurojn de la malaperintoj. Nun ni estis sole, kaj mi turniĝis al la kaptito, kiu ankoraŭ estis fikstenata de Pappermann:

„Stariĝu, bubo! Kaj aŭskultu, kion mi diras al vi!“

Pappermann duone liberigis lin, tiel ke li povis leviĝi. Mi pluis:

„Se vi respondas al miaj demandoj sincere kaj laŭvere, ni lasos vin libere.“

„Tiel, ke mi povas foriri ajn kien mi volas, ĉu?“ li rapide demandis.

„Jes.“

Li vidis al mi ekzamene.

„Vi ne aspektas kiel mensogisto. Mi esperas, ke Vi plenumigu Vian vorton. Do diru, kion Vi volas scii!“

„De kiu estas la tri makulataj virĉevaloj?“

„De la bieno de unu Old Surehand.“

„Kaj la muloj, ĉu?“

„De ĵus tie.“

„Ŝtelite, ĉu?“

„Ne, fakte ne. Estis nur defraŭdo, eta, estimetinda defraŭdo. Corner estis eksciinta, ke la plej bonaj ĉevaloj kaj muloj de Old Surehand estis pretigintaj por germano, kiu

estis atendata kun lia edzino. Oni ankaŭ atendis kelkajn junajn pentristojn kaj skulptistojn, kiu devis esti ekipataj —“

„Ĉu ekipataj? Pro kio?“

„Pro rajdi al la apaĉujo, al granda spektaklo. La juna Surehand estis invitita ilin al tio, sed estis, same kiel lia patro, jam delonge antaŭvojaĝinta. Tiam ni venis tien. Estis speco de maskigado, de karnavalaĵo. La administranto kredis al ni, kaj eldonis ĉion, kion ni postulis.“

„Ha! Tial vi nun ankaŭ estis skulptistoj kaj pentristoj!“

„Tiel ĝi estas!“ li ridis. „Demandu plu!“

„Mi estas je la fino. Se mi eniĝus plu en viajn sekretojn, estiĝus tre malfacile aŭ eĉ neeble plenumigi mian promeson. Mi do ne volas scii ion plu.“

„Kaj mi rajtas foriri, ĉu?“

„Jes.“

„Mi dankas! Vi estas dignulo, *Sir!* Sed mi estas sen ĉevalo!“

„Tion mi ne povas ŝanĝi.“

„Ĉu Vi ne povas almenaŭ doni al mi unu el la muloj?“

„Ĉu ŝtelitan aĵon? — Ne!“

„Sed kiam Vi nun scias, ke la bestoj fakte ne estis nia posedaĵo, Vi ankaŭ ne rajtas teni ilin!“

„Mi ankaŭ ne volas teni ilin. Mi konas Old kaj ankaŭ Young Surehand:on. Vi povas povas fidi pri tio, ke li ricevos, kion vi ŝtelis de li, almenaŭ tiom, kiom mi povis savi. Ankaŭ la tendon mi tenos.“

„*Well!* Egale al mi! Sed sen ĉevalo mi ne povas foriri. Vi hodiaŭ ekscios, ke ie tie ĉi iu estis prenita de ajn iu. Ĉu tio ne afliktos Vian konsciencon?“

„Eĉ ne ete. Ĉar ne ekideos al mi aflikti ĝin per tio, kion faras aliaj.“

„Bone! Prete! Adiaŭ!“

Li turniĝis pro foriri. Sed la gastejestro, kiu estis aŭskultinta, stariĝis antaŭ lin.

„Se Vi senkondiĉe volas enaferigi alian konscion, mi uzeblas al Vi la mian. Mi tuj prizorgos, ke hodiaŭ kaj tie ĉi ne malaperos ĉevalo! Ne ajn ie kaj ankaŭ ne de ajn iu! Post dek minutoj la tuta urbo scios, ke Vi sukcesis fuĝi de ni kaj volas ŝteli ĉevalon. Foriĝu!“

La homo jam volis agi laŭ tiu ordono, sed nun Pappermann ekprenis lian brakon kaj parolis:

„Nur unu vorton plu! Tiuj du *gentleman*:oj, kiuj volas lasi Vin forkuri, ambaŭ forĝis la ĉefajon. Vi ja havas monon, ĉu?“

„Tiom, kiel mi bezonas, jes.“

„Kie?“

„Tie ĉi en la poŝo.“

Li elpoŝigis bonplenigitan saketon, pro fanfarone montri ĝin al ni, kaj aligis: „Kial Vi demandas pri mia mono?“

„Pro la pago!“ Pappermann respondis, ridante rekte en lian vizaĝon. „Vi sciu, ke mia nomo estas Makŝ Pappermann, kaj mi ne lasas min trompi tiel de tiaj uloj, kiel

estas Vi! Vi pagos la kostojn, Viajn kaj tiujn de Viaj kunuloj!“

„Miajn, pro mi! Sed ne tiujn de la aliaj; ne ekideos al mi!“

„Sed devos ekidei al Vi! Donu la saketon!“

Li ŝiris ĝin el lia mano, rapide fordonis ĝin al mi kaj diris:

„Havu la bonvolon pagi, *Sir!* Mi intertempe fikstenos la fiulon.“

Kiel dirite, tiel farate. La nova gastejestro fakturis, mi pagis la sumon kaj tiam redonis la saketon kun la restanta mono al la viro. Post tio li malaperis, malbenante kaj sakrante, sed tamen laŭeble rapide. —

AŜTA

Post ke la ĉevalŝtelisto estis foriĝinta, mi remetis la ĉefan ornamaĵojn kaj la revolverojn en la kofron. Tiam ni povis finfine, finfine manĝi. La „Juna Aglo“ estis ricevinta vivkoloron. Videble estis estinta ege malagrable al li, ke ni estiĝis atestantoj de lia malfortaĵo. Gravis al li esti respektata de ni. Tial li rakontis al ni, ke nun antaŭ preskaŭ kvar tagoj, malsupre ĉe la Carriso Creek, lia ĉevalo estis ŝtelita, kune kun la tuta enhavo de la selpoŝoj. Survoje estis al li kiel nutraĵoj nur kelkaj manĝeblaj radikoj aŭ beroj, nenio pli. Li devis nun porti sian pezan pakon mem, kaj tiel ne estis miraklo, ke li estis alveninta tie en tia ega laciĝo. Li eksciis, ke lia ledvestaĵoj tie pretis netuŝite por li. Nun li manĝis kun ni, malrapide kaj en la maniero de viro, kiu kutime estas en civilizitaj societoj. La Koretinjo ŝatas ĝin eksternorme, kiam bongustas al siaj gastoj. Ŝia vizaĝo brilis per plezuro.

Mi havis miajn proprajn pensojn pri li, sed diris nenion. Ankaŭ Pappermann certe nur tro ŝate estus eksciinta iom pli pri li; sed la indiano malgraŭ sia juneco faris tian impreson al li, ke li ne riskis molesti lin per demandoj. Sed mia edzino, mia edzino! Al ŝi ĉia malklareco naŭzas! Pri ĉiu aĵo ŝi sciis ekzakte, kion ŝi pensu. De indiana pacienco kaj retenigo ŝi estas nur ege malmulte ravigata. Ŝi rigardis la „Junan Aglon“. Mi vidis klare je ŝi, ke li plaĉis al li eksternorme. Kaj ve al tiu, kiu plaĉas al ŝi! Ŝi frapas sur lian koron, kaj ajn kio estas en ĝi, devas eliĝi, ĉu li volas aŭ ne. Ja ne, ke ŝi estas scivolema aŭ eĉ maldiskreta; entute ne. Sed kiam ŝi vidas iun en embaraso, kaj volas helpi al li, ŝi havas tute propran manieron ekscii, en kiu maniero tio povas okazi kaj esti farata plej bone. Tiel ĝi ankaŭ estis tie ĉi! Ni jam ne estis atingintaj la ostaron de la maljuna kokino, kiu ankaŭ estis metita antaŭ nin, kiam la „Juna Aglo“ jam estis dirinta al mia edzino, fakte sen ŝia igumo, ke liaj armiloj estis ŝtelitaj, ke li ne plu havis monon, kaj ke li volis iri suden, sed kien, tion li ne eldiris. Je tio ŝi ĵetis vidon al mi, kiun mi komprenis. Mi devis inviti lin rajdi kun ni. Kaj ĵus tio estis ja estinta la kaŭzo, kial mi estis volinta havi tri ĉevalojn kaj ne nur du. Mi faris la rilatan demandon al li. Feliĉa brilo ekaperis sur lia vizaĝo. Li salte starigis, sed tuj residiĝis, ĉar indiano montru nek ĝojon nek doloron tiel malkaŝe. Per la ekbrilo de lia vizaĝo mi vidis, ke li, kvankam li neniam antaŭe estis vidinta min, tamen supozis, kiu mi estis.